

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



61a jaro n° 2  
majo - junio - julio 1969

60a jaro n° 2  
novembro - decembro 1968




# Sonorilo

TRIMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice  
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81  
Maertens Grégoire  
Poupeye Charles

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO

Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken Tel. (03)276643

HONORA ĜENERALA PREZIDANTO

HONORA VICPREZIDANTO

Dro Kempeneers Paul

Sielens Henri

HONORA PREZIDANTO

Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ

Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk  
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

VICPREZIDANTO

Roose Fernand

ĜENERALA SEKRETARIO

Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO

Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis  
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTO - Balleux René, Oude Donkiaan 83 Deurne

POŝTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 OUDE DONKLAAN 83 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2  
P.K. 9051 25

## La Ŝajno ne trompu nin .....!

Tiu ŝajno estas ke la Angla lingvo iĝas la universala lingvo. Ke la Angla lingvo estas la plej uzata en la kampoj de scienco, komerco kaj turismo; ankaŭ ke en la oriento de Eŭropo kaj de la mondo la lernado de tiu lingvo plivastiĝas; jen estas faktoj.

Sur la bazo de tiuj faktoj, iuj konkludas ke la Angla lingvo - se ne teorie; se ne jure - tamen efektive iĝas la universala lingvo.

Kion ni devas pensi pri tio? Kiu estas la persono kiu povas antaŭvidi la estontecon? Ĉu ekzistas tia persono? Kiam estos universala lingvo? Kiu ĝi estos? Kia ĝi estos?

Oni povas diri ke efektive la Angla lingvo iĝos la universala lingvo, kondiĉe ke la evoluo daŭros en la sama direkto ĝis la fina punkto de tiu evoluo. Sed tio estas precize la demando. Ĉu la evoluo ne iros, je iu momento, en alia direkto? Tiu supereco de la Angla lingvo ne estas la unua kazo en la historio.

En la 18a jarcento havis la saman superecon la Franca lingvo. En tiu jarcento ni vidas ankaŭ ke en la diversaj naciaj lingvoj enpenetris Francaj vortoj. La inversa fenomeno nun manifestiĝas en la Franca lingvo, tiel ke oni ofte parolas pri iu "Franglais". Same por la 18a jarcento oni konstatas iun "Germanfranca" aŭ "Francgermana" (laŭ persona prefero). Ekzemple la Prusa reĝo Fredriko ia foje admonis sian filon per jenaj vortoj: "Wenn ein junger Mann sottisen thut, solches kann mann lhm als Jugenfehler pardonniren; aber mit Vorsatz Lacheteten zu thun ist impardonnable". La kanceliero de Frederiko IIa, Cramer, plendis pro tio ke la junaj personoj elparolis sian propran nomon laŭ Franca maniero. La diferenco kun la nuna situacio estas ke nun ĉefe teknikaj, fakaj vortoj el la Angla penetras en la aliajn lingvojn.

Ni devas pli enprofundiĝi en la problemo. I.a. devas demandi al ni kiu(j) estas la motivo(j) kiu(j) instigas la orientanojn por pli studi la Anglan lingvon. Tiuj motivoj povas esti pragmataj (legebleco de la efektive tre multaj sciencaj kaj aliaj verkoj en la Angla lingvo; ebleco de kontaktoj k.a.) Tiuj motivoj povas esti politikaj (strebado al iu proksimiĝo kun la Angla aŭ pli verŝajne kun la Usona grandpotenco). Ili povas esti kulturaj. Ĉiuj ĉi tiuj motivoj ne implicas pretecon por definitiva, jura agnosko de la Angla kiel universala lingvo. Kaj se oni volas argumenti ke tio tamen iras al fakta agnosko, tiam ni devas diri jes, tiel longtempe kiel la motivoj ekzistas kaj validas. Do, kiu diras ke tiu supereco de la Angla estos eterna? Ĉu kun la Angla ne okazos la sama kiel kun la Franca?

Intertempe ni ankaŭ ne forgesu la daŭran kaj ankaŭ fortan kontraŭstaron kontraŭ la Angla. Tiu kontraŭstaro povas ie malpliigi, sed tie pliigi. Kiu tendenco fine venkos?

Kiam ni, esperantistoj, kontraŭstaras la Anglan lingvon kiel universalan lingvon pro principo, nome la principo de la absoluta egalrajteco de



## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko

Telefono 272875

ĉiuj nacioj en la inter-nacia vivo, tiam multaj nomas nin fanatikuloj. Sed antaŭ ne longe iu Japana eminentulo ne povis paroli la Japanan lingvon en internacia konferenco, kaj diris: "Se nin, Japanojn, oni devigas paroli fremdan lingvon, tiam la justeco postulas ke ankaŭ la aliaj devas paroli lingvon fremdan." Ĝuste la sama starpunkto kiel la nia, sed per aliaj vortoj esprimita. La reakcioj substrekis la nepran ĝustecon de tiu tiamaniere esprimita starpunkto.

Tute realisme ni povas esti certaj pri tio ke se iuj nacioj - kiuj ajn kaj kie ajn - akcelas (momente) la lernadon de iu fremda lingvo (en tiu-ĉi kazo de la Angla) ke ili faras tion el konsideroj de portempaj intereso-  
soj kaj de iuj spiritaj aŭ aliaj profitoj. Estu la situacio ŝanĝita, ŝanĝiĝos ankaŭ ilia sinteno.

Je Esperanto oni ne povas havi tiajn konsiderojn, ĉar ĝi ne garantias la superecon de iu nacio aŭ de iu kulturo; ĝi garantias nur absolutan egalrajtecon kaj diskonatigon de ĉiuj kulturoj. Esperanto troviĝas ekster la kadro de naciaj antagonismoj; ekster la kadro de imperialismaj strebadoj.

Ni restu kvietaj. Ni pririgardu la evoluon kritike. (Ne kritikaĉe; sed kun juĝopovo). Instruitaj de la historio ni ne perdu fidon. Despli ne ĉar nia ideologio estas nerefutebla. Kaj ni sentu nin fortaj. Ja Esperanto estas jam kulturlingvo, en la tuta mondo disvastigita. Pri tio ni ankaŭ fieru (ne estante malhumilaj). Ni alportas valoran trezoron al la homaro.

Sed ni samtempe estu konsciaj pri tio-ĉi: por esti portanto de tiu trezoro, nepre necesas perfektigi en la kono de tiu lingvo kaj en la praktikado de ĝi. Alie ne eblas.

La ŝajno ne trompu nin.

Drs. Fernand Roose

## 7-a markola kongreso

51-a kongreso de B.E.ĉ.

BRUGO 3/4.5.1969

8-a kongreso de BEJA

Kiel ĉio evoluas, ankaŭ niaj kongresoj evoluas. Ni konstatas ke apud kaj ne malofte anstataŭ, la naciaj kongresoj, okazas regionaj kaj eĉ du- aŭ trilandaj kongresoj en iu urbo de la landlimoj. Tiel la trilandaj renkontiĝoj en Lieĝo, Limburgo kaj okcident-Germanujo, kiel jam de post jaroj regule okazas. Tiel okazis je Pasko renkontiĝo Aŭstrujo, Italujo, Jugoslavio en Arnoldstein. Tiel okazos en Perpignan la 8an de junio renkontiĝo Hispana-Franca. Cetere dum la inaŭgura paroladeto D-ro Denoël substrekis tiun fenomenon kaj montris ĝian necesecon. Tiel ni havis nun la jam sepan markolan kongreson de esperantistoj el Belgujo, Nord-Francujo kaj Sud-Anglujo.

La ombro sur tiu kongreso.

Tiun ombron ne metis la foresto de la suno. Tute ne. Ĉar la Bruĝaj organizintoj havis la bonŝancon ke varme ridianta suno inundis la tutan kongreson. Nur pluvis iom kiam ni estis en la salonego por danci. Sed jes la foresto de du personoj kaŭzis tiun ombron. Ĉu oni povas imagi kongreson sen nia prezidanto M. Jaumotte? Li, kiu sola kapablis krei la tutan atmosferon; Li, kiu estas la alte superreganta gvidanto (jam lia voĉo dominacias). Li kuŝas malsana en la lito. Li ne povas ion ajn fari. Ni imagas kia doloriga frapo tio estis. Tamen ni esperas ke la bonega sukceso kaj la glata funkcio de ĉio estis por li tre konsola. La ĉeestantaro sendis telegramon, ĉar tutevidente ni konstante pensis pri li. La alia forestinto-kiu normale devis ĉeesti- estas la iniciatinto de tiuj markolaj kunvenoj, la Anglo Norman Smith. En tragikaj cirkonstancoj li mor-



DE MALDEKSTRE AL DEKSTRE

S-ro Poupeye Ch., S-ro Verstraeten J., D-ro Denoël, S-ro Doyelle, S-ro Debrouwere, F-ino Poupeye, S-ro Hawker.  
Kliso "Brugsch Handelsblad"



tis. Lia edzino sendis salutleteron. Ni havis minuton da memora silento dum la inaŭguro.

Junularo antaŭenmarŝas... plu kaj pli...

En la raporto pri nia kongreso en Oostende ni jam substrekis tion. Kiom despli ni povas substreki nun. En la dancvespero montriĝis evidente la ĉeesto de tre multaj gejunuloj. Paul kaj Piet Blondelle prezentis muziknumeron, kiun ili mem verkis kaj kiu agrable surprizis pro la artaj enhavo kaj realigo. La aparta kongreso montris ilian gravan lokon en nia nuna movado. Aliloke vi povas legi raporton. Tuta junulara grupo venis de Valenciennes.

La kongreso antaŭ la publiko.

La kapelo estis preskaŭ plena por la Sankta Meso dimanĉon matene je la 9a horo. Ne dubeble la Bruĝanoj kaj la turistoj surpriziĝis kiam ili unuan fojon aŭdis tekston en Esperanto. Estis la epistolo kiun legis juna samideano Dirk Iserentant. Kaj poste la prediko estis ankaŭ kaj sole en Esperanto. Nia jam konata Rev. Saen elparolis ĝin. Kaj fine la oficanta pastro mem elparolis la adiaŭan saluton, post la Nederlanda, ankaŭ en Esperanto. Ĉio tio estis gravega propagando por nia lingvo. Ĉar certe tre multaj personoj ĝis nun ankoraŭ ne venis en kontakto kun Esp. kaj eĉ tiuj kiuj jam scias ke ĝi ekzistas, ne imagas ke ĝi estas jam uzata ankaŭ en la katolika liturgio.

La dua publika manifestacio estis la inaŭguro de Esperanto-avenuo en Sint-Kruis (Sankta Kruco), antaŭurbo de Bruĝo. Ankaŭ tiam ni havis la bonŝancon de radianta suno kiu ĉion agrabligis despli. Sinjoro urbestro de Pierpont mem volis inaŭguri. Li salutis nin per amikaj, konvinkaj vortoj esperanten tradukitaj de S-ro. Ch. Poupeye. S-ro David De Meilenaere, kiu havas grandan meriton en la efektiviĝo de tiu avenuo, povis formeti la tukon. S-ro F. Roose en laŭcirkonstanca paroladeto unue Nederlandlingve kaj poste resume en Esperanto klarigis iom la historion de la nomdonado al avenuoj kaj placoj, kaj montris ilian faktan signifon. Li dankis ankaŭ sinjoron urbestron, precipe ĉar estas jam la dua fojo en ankoraŭ ne unu jaro ke li mem honorigas esperantistojn (nun, kaj la unuan de novembro okaze de la jubilo de la junulara grupo). Ankaŭ S-ro De Brouwere paroladetiĝis. Ni ankoraŭ menciis ke tiu nova avenuo ne situas en iu perdita ekstremo de la urbo, sed en bela nova kvartalo.

Kaj la kulturo en nia kongreso.

Ni jam menciis la muziknumeron de fratino Blondelle.

Estis organizata gvidita vizito de la urbo. Ĝi okazis sabaton posttagmeze. Sub kompetenta gvidado de F-ino Marie-Louise Roose, grupo de gekongresantoj vidis la ĉefajn lokojn kaj monumentojn kaj artaĵojn.

Elstara punkto estis sendube la montrado de diapozitivaj per speciala procedo, dimanĉon matene. Oni prave povas nomi ĝin: muzika, plastika kaj poezia artverko. Ĝi montris la kontraston inter antikva kaj moderna Bruĝo; ankaŭ en multegaj detaloj. Tial necesis kompreni la en Nederlanda lingvo akompanantan tekston. Tio estis malfacilajo. S-ro Maertens klopodis plej eble bone komprenigi la signifon en necese mallonga esperantlingva klarigo. La prezentado de la nuna junularo estis unuflanka. Tamen la tuto estas vera artverko. La kreintoj, gefratoj Van de Walle,

estas veraj artistoj. Baldaŭ ili montros la diaojn antaŭ urbestro kaj skabenaro. Espereble ili ricevos la merititan materian kaj moralan subtenojn.

Sabaton vespere S-ro Maertens, kiu estis la organizinto de la karavano al la universala kongreso de Madrid, havis la okazon montri siajn diapozitivajn al tiuj partoprenintoj kiuj ne ankoraŭ povis vidi ilin. Fakte ĉiuj ĝuis kaj revivis iom tiun vojaĝon kaj tiun kongreson.

Kaj la laboro en nia kongreso.

Mi, kiu verkas tiun-ĉi raporton, povas atesti ke S-ro Maertens faris, la plejmulton de la laboro. Pri ĉio li pensas: kaj preskaŭ ĉion li antaŭvidas kaj preparas. Ni menciis ankaŭ la multan kaj gravan laboron de S-ro Poupeye kaj de lia filino Yvonne. La hazardo volis ke preskaŭ sammomente S-ro Poupeye estis festata pro 50 jaroj (jes 50) en ofico kiel juĝoregistristo. En Bruĝo li estas tre konata, kaj okazis honorigo. Tiun okazon S-ro Roose profitis por honorigi lin ankaŭ en nia medio. Tion li faris elvokante la grandegajn meritojn kiujn S-ro-Poupeye havas por Esperanto. Li donis florojn (kaj kisojn) al S-ino, kaj donigis libron al S-ro P. pere de ĉarma membrino de la junulara grupo, Hilde Lauwers. Malfacile estis elekti inter du proponoj por venontjara kongreso. La Markola okazos en Tournehem, Nord-Francujo kie estas granda publika ĝardeno kun ĉiuspecaj allogaĵoj. Kaj tiea meblofabrikanto promesis prizorgi ĉiujn materiajn aranĝojn. Ne malmultaj do jam aliĝis al tiu 8a markola.

Sed venis ankaŭ tre alloga propono de Aachen, de la urbestro mem. Ni decidis partopreni al ambaŭ. La unua okazos la unuan de majo 1970 (la unua de majo estos vendredo; do estos feriotagoj ĝis lundo). La alia okazos dum la paskotagoj; ne malpli ol kvin tagoj. En tiu-ĉi kongreso estos speciale pritraktata "La Lingvaj Problemoj en Eŭropo". La aliĝkosto estos 50 Fr. por la unua; kaj 150 Fr. por la dua.

Okazis laborkunveno de la administrantoj de BEF. La ĉefa temo estis "Esp. en la instruado". Montriĝis pere de la tre multaj klopodoj de D-ro Denoël ke ministerio estas vera labirinto. Nekalkuleble estas ĉe kiom da personoj kaj instancoj iu propono devas veni. Estas ankaŭ ŝajna kontraŭdiraĵo ke ne malmultaj gravaj personoj favoras esperanton... kaj ke ni tial malfacile kapablas atingi ion. Nu, ni daŭrigas la laboron, unue por oficialigo de diplomo... kaj poste... ni vidos.

Kaj la postkongreso.

Jes, okazis postkongreso; kvankam ne oficiale. Post la inaŭguro de la Esperanto-avenuo en St.-Kruis, ĉiuj iris al la sidejo de la junulara grupo. Tie estis manĝeto; kaj devis okazi la ferma ceremonio.

Sed vespere, S-ro Iserentant gvidis promenadon de la restintaj fremdaj gesamideanoj laŭlonge de la lumigitaj kanaloj. Tio estas rave bela spektaklo. Landon ili admiris la faman procesion de la Sankta Sango. Tagmeze ankoraŭ grupo de preskaŭ 40 personoj kune tagmanĝis. Kaj tio ne ankoraŭ estis la fino. Efektive diversaj grupetoj iris al privataj hejmoj, ĉu de S-ro Iserentant ĉu de S-ro Poupeye por daŭrigi la kongreson kiun evidente ili ne volis fini. Kaj restis tiu gaja atmosfero de feliĉaj gesamideanoj, feliĉaj ĉar ili estas foje kune; feliĉaj ĉar la kongreso tiel bone sukcesis.



## Epilogo

Estis entute 173 enskribintoj al tiu kongreso. Inter ili 23 Angloj kaj 35 Francoj. Al la bankedo partoprenis 66 personoj. Ĉiuj ricevis kongreslibron kun artikoleto pri Brugge, kaj kun foto, pri la fama madono de Michel-Angelo: kun historieto pri la Markolaj kunvenoj kaj kun nomaro kaj adresaro de la kongresantoj. Ĝis nun ni nur aŭdis laŭdojn pri la kongreso kun kelkaj rezervoj rilate al la loĝado. Estas fakto ke Bruĝo preskaŭ ne havas modernajn hotelojn. Ni spertis denove ke oni ĝenerale ŝatas la Bruĝajn kongresojn, unue pro la urbo mem; kaj ankaŭ, eble, ĉar oni fidis la Bruĝajn esperantistojn? Ĉu mi estas nun malhumila? Ni ja disponas pri nombro de kapablaj kaj laboremaj esperantistoj. Kaj tie-ĉi mi ne povas forgesi la junularajn gemembrojn kiuj vendis poŝtkartojn, kiuj gvidis la alvenintojn al la ejo, kiuj gardostaris ĉe la ekspozicio ktp. Kaj mi certe ankaŭ ne forgesu la en retiriĝemo konstante laborantan S-ro Iserentant.

Specialan mencion meritas la jam fama orgenisto Jo Haazen, kiu belligis la ceremonion de la S. Meso, i.a. ludante "La Espero". Ni danku ankaŭ sinjoron Doyelle, kiu estis la ĝenerala prezidanto de la kongreso. Se efektive lia tasko en tiu-ĉi kongreso ne estis malfacila, lia alia tasko, nome daŭrigi la kongresojn, postulas daŭrajn zorgojn kaj laboron.

Kaj mi vere ne scias kiujn mi devas pli danki: la organizintojn, aŭ la ĉeestintojn? Ĉar ni ĉiuj en Bruĝo estas feliĉaj pro tio ke ni povis ĉion tion doni al vi.

Karaj geamikoj ĉiuj, ĝis la venonta.

Unu Kiu Ĉeestis.



La nova Esperanto-aleo en Sint-Kruis: ĉe la indikilo, S-roj Paul Blondelle kaj Dirk Maertens.

Kliŝo "Brugsch Handelsblad,."

Poŝtkarto kun la supra bildo havebla ĉe Dirk Maertens, Prins Leopoldstraat 51 Sint-Kruis, kontraŭ pago de 10 F. (eventuale en poŝtmarkoj).



## KRONIKO

### MINISTERIO KIU ION FARAS POR ESPERANTO

Tio estas ne en Belgujo sed en Bulgarujo.

Je dato de 13-11-'68, sub numero S-7-1023 la Bulgara ministro de Komunikado sendis al la ĉefoj de la distriktaj direktoj kaj al Radio kaj PTT-entreprenoj cirkuleron en kiu li apogas proponon de la Internacia Postista kaj Telekomunikista Asocio por organizi kursojn de Esp. Li rekomendas diskonigi tion al la lernantoj, doni ĉiajn facilajojn kaj klarigi la gravecon de Esp.

Se nia ministerio de Instruado volus dissendi similan komunikon al lernejestroj kaj profesoroj de niaj lernejoj, ĝi poste ne devus argumenti ke ĝi ja volus doni ĉian apogon al Esperantoinstruado, sed ke bedaŭrinde ne estas profesoroj kiuj konas tiun lingvon.

### NOBEL-PREMIO KAJ ESPERANTO.

Universala Esperanto-Asocio estas tiun ĉi jaron denove proponita kiel kandidato al la Nobel-premio por la Paco, pro sia aktiveco favore de la internacia interkompreno.

Prezentis la proponon: tridek-ok anoj diverspartiaj de la sveda parlamento, pluraj italaj parlamentanoj kaj diversaj aliaj gravaj personoj.

### S-RO ALFANDARI MORTIS

La 1-an de majo mortis en Bruselo, en sia 81-a jaro, S-ro. Arturo ALFANDARI, aŭtoro de NEO ("Internasyona Adlinguo"). Lia cindrigo okazis en Ukkel. Li estis fervora adepto de la ideo pri internacia lingvo, bedaŭrinde sub formo de tiu 1001-a "plibonigo de Esp.", al kies disvastigo li dediĉis multan tempon kaj monon. Perdita energio, kiu estus povinta efike helpi la Esperanto-movadon, sed male nur lomete kontraŭagis ĝin, precipe en nia lando.

Ĉu lia verko postvivos lin? Pri tio oni povas serioze dubi.



## NENIU SCIAS... (Esperanto facila)

Antaŭ miloj da jaroj vivis en Ĉinujo kamparano, kiu por tuta havaĵo posedis nur unu filon kaj unu ĉevalon. Pro la printempo frenezigita, la virĉevalo saltis trans la barilon kaj malaperis. La vilaĝanoj venis por saluti la kamparanon kaj al li diris :

- Malfeliĉulo, vi posedis nur unu ĉevalon kaj nun vi perdis ĝin.

La kamparano respondis : Neniu scias kio estas bona, neniu scias kio estas malbona.

Kelkajn tagojn poste la virĉevalo revenis fiere sekvata de kvar ĉevalinoj. La vilaĝanoj diris al la kamparano :

- Feliĉulo, vi posedis nur unu virĉevalon. Hodiaŭ vi havas unu virĉevalon kaj kvar sovaĝajn ĉevalinojn.

La kamparano respondis : Neniu scias kio estas bona, neniu scias kio estas malbona.

Lia filo volis dresi la ĉevalinojn. Hufobato lin jetis teren.

- Malfeliĉulo, diris la vilaĝanoj, vi havis nur unu filon kaj jen li estas kripla.

La kamparano respondis : Neniu scias kio estas bona, neniu scias kio estas malbona.

Milito eksplodis kaj mobilizis ĉiujn servokapablajn virojn.

- Feliĉulo, sopiris la vilaĝanoj, ĉiuj niaj filoj soldatiĝis kaj la via restas apud vi.

La kamparano nenion respondis sed pensis :


Malfeliĉo neniam estas tiel profunda kiel oni ĝin timis, nek feliĉo tiel kompleta kiel oni ĝin esperis.

Sa Pu Pej


### LA INTERNACIA CIRKULERO :

Tre interesa eldono de Paul Peeraerts, Drakenhoflaan 97 Deurne - Antwerpen pri internacia korespondado kaj kolektado. Se vi volas ĝin ricevi dum la tuta jaro, skribu al la menciita adreso kaj aldonu unu respondkuponon.

## OPTIKA TROMPO



Post nia alvoko en la numero du de 1968, ni ricevis la ĉi-kune presitajn trompajojn. 1) Ĉe la krucejo de blankaj linioj, ekestas nigra punkto.



2) Niaj okuloj ĉiam vidas la blankan parton de la kubo kiel la plej supran : do estas ses kubo ; sed turnu la desegnajon : vi nun vidas la sepan.



RAPORTO PRI LA JARKUNVENO dum la 8a kongreso de BEJA en Bruĝo,  
la 4an de Majo 1969.

Post enkonduka vorto de la prezidantino, Roger van Humbeeck, eksiĝanta ĝenerala sekretario, raportis pri la pasinta jaro kaj substrekis la diversajn okazaĵojn por la junularo, i.a. en Wilsese, St.-Kruis, Verviers kaj Deurne.

La membraro atingis 151 sed bedaŭrinde aniĝas malmultaj valonoj.

"Koncize.. aperadis regule, kaj enketo montris ke oni, krom la eksteran aspekton, ne multon ŝanĝu al ĝi.

"Tintilo.. kaj "Esperantista Amikeco.. kunfandiĝis kaj oni esprimis la deziron ke ankaŭ la grupo de Wilsese kaj la espereble baldaŭ naskiĝonta grupo de Antverpeno aliĝu.

Fine Roger van Humbeeck alvokis por ke oni abonu la senpagan revueton "Internacia Cirkulero", cele trovi rimedojn por uzi esperanton.

La kasistino f-ino Yvonne Poupeye laŭtleĝis raporton el kiu evidentiĝis ke la financa situacio de BEJA estas bona.

Venis nun la elekto de la nova estraro. Estis reelektataj la prezidantino f-ino Agnes Geelen flandra prezidanto J. Maertens kaj valona J. Jacob, la valona sekretario H. van der Hagen kaj la kasistino Y. Poupeye.

Per aplaŭdo estis elektataj Walter Lauwers (Bruĝo) kaj Paul Peeraerts (Antverpeno) kiel resp. flandra kaj ĝenerala sekretarioj. Krome Karel de Reyck enfunkciis kiel reprezentanto de la grupo de Wilsese kaj Paul Peeraerts kiel komitatano de BEJA por TEJO.

La raportanto,  
Paul Peeraerts

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** Pvb.a.

ANTWERPEN, 8, Vleminckveld

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

Vi ne vizitas Helsinko? Despli bone! Ŝparu vian monon por la BEF-karavano al VIENO 1970 (kun vizito al Prago kaj Budapeŝto)!

# Bibliografio

## Recenzoj



ONI REEKIPIS NIAJN POETOJN !

K. Kalocsay, G. Waringhien, R. Bernard : "Parnasa Gvidlibro". Dua eldono, reviziita kaj kompletigita. 160 p. Eldonis Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun "Heroldo de Esperanto", 1968. Prezo : 1,60 US. Dol.

La fundamenton de nia versaro jam eldonis "Literatura Mondo" en 1932. Verkis ĝin du kompetentuloj, K. Kalocsay kaj G. Waringhien, sub la duobla titolo : "Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa Gvidlibro". Populara iĝis la dua titolo, ĉar ĉiu esperantisto, kiu iel ajn rilatas al la literaturo, ĝin konas, eĉ se li ne aŭ nur supraj legis la libron. Iom erariga estis la unua titolo, ĉar la plej funda studo de la metriko kaj de la plena "arto poetika" ne sufiĉos por fari de vi poeton, se vi ne "perceptas

poezie". Tamen, sennombraj estas tiuj, kiuj senkonscie portas en si poeziajn ĝermojn. Ĉiu rajtas do senkondiĉe konsulti la libron. Eĉ pli : malferminte sin por la versarto, ĉiu povos, ĉu principe (t.e. ĝuante poezion), ĉu fakte (t.e. verkante) fariĝi poeto.

Mi volis rimarkigi ĉi tion, ĉar la nova eldono de la libro ne plu sugestias, ke per ĝi oni fariĝos poeto kaj simple titoliĝas : "Parnasa Gvidlibro". Kompare al la unua eldono, ĝi ankaŭ estas presita sur iom malpli bonkvalita papero kaj per malpli grandaj literoj. Ĝi tamen aspektas tre agrable kaj ĝi estas facile legebla kaj rapide konsultebla. Precipe, al la jam riĉa enhavo ĝi aldonis ankoraŭ multon.

Ekz., la unua parto, "Skizo de Esperanta Metriko", science verkita de G. Waringhien, ne nur estas kompletigita kaj adaptita al la evoluo de la Esperanta poezio, sed ĝi samtempe estas multe pli klare ordigita. La trian parton, "Esperanta Rimaro", antaŭe kompilitan de G. Waringhien, pliampleksiĝis R. Bernard. Ĝi nun baziĝas sur la 4-a eldono de P.V. kun "Suplemento" kaj krome enhavas multajn neologismojn uzatajn en la literaturo. Ankaŭ la nombro de la propraj nomoj estas plialtigita.

Plej populara en la libro restas la meza parto. Ĝin ja okupas, kiel antaŭe, "La Arto Poetika" de C.E.R. Bumy, pseudonimo de K. Kalocsay.

"Jen, post Horac', Boileau, Gautier, Verlaine,

nun ankaŭ mi, tre profesormiense,  
didaktan liron en la manon kaptas,  
kaj ĝin por nia lingvo mi adaptas."

Eble Kalocsay tiel grave komencis sian poetikon por ne tro malharmonii kun kelkaj el la antaŭuloj. Sed lia "profesora mieno" baldaŭ bonhumore ridetas al vi kaj lia didaktiko estas ĉiam sagaca, freŝa kaj sprita, ofte ironia kaj satira. Tre sagaca ekz. estas lia "asertego"

"ke la logiko servu al la lingvo,  
kaj ne la lingvo estu ĝia sklavo."

Aŭ pli precize :

"se io estas jam familiara,  
natura, kaj facile, simple klara,  
kaj donas bonan helpon por koncizo,  
tion sentime uzu, kun devizo :  
de nia lingvo for la trudkitelon !  
Vi tute rajte faros ĉi ribelon,  
ĉar ĉio prave vivas kaj funkcias,  
kion la vivo kaj kutim' sankcias." (VI)



Kontraŭ ĉiuj, kiuj emas facilanime kritiki la riĉecon de nia poezia lingvo, jen la vidpunkto de la poeto :

"La konstruanto de l' litera turo  
kredante, ke li penas por Futuro,  
ne povas pensi dum la alta kanto  
pri la stumbladoj de la komencanto.  
Li volas forĝi lingvon, riĉe brilan,  
al grandaj lingvoj indan kaj similan,  
ne lingvon palan, platan kaj senkultan,  
lernidan, ĉar ĝi ŝparas penon multan,  
sed lingvon grandan, pompan, altnivelan,  
lernindan, ĉar ĝi ŝparas penon multan.

La konkludo do estu :

"ke alta ĝuo indas altan penon,  
ne povas esti arta fundamento  
la triumfigo de l' maldiligento." (VI)

Tiuj ekzemploj certe sufiĉas por konvinki vin, ke "La Arto Poetika" estas alloga literatura sentencaro, kiun oni nepre legu, relegu kaj primeditu. Ĝis en la elekto de siaj motoj ĝi montriĝas altvalora. Mi citu tiun de Madach :

"La arto plej perfektas, se ĝi tiel  
sin kaŝas, ke ni ĝin eĉ ne rimarkas." (IV)

Ankoraŭ unu de iu (onidire) "Neko Nato", aludanta moke-malice la konduton de certaj teorigistoj, eterne malkontentaj pri la stato de afero, kies antaŭeniradon ili mem konstante malhelpas per siaj tro rigidaj, malrealaj aŭ maloportunaj principoj kaj reguloj :

"Se knabo volas kuri,  
piedojn liajn ŝnuri,  
kaj poste miri, miri,  
ke li ne povas iri..." (VI)

La reeldono de "Parnasa Gvidlibro" certe ne ŝnuros la piedojn de niaj poetoj. Kontraŭe, ĝi reekipos ilin per ĉio, kion ili bezonas dum la longa irado al siaj multnombraj celoj. Ekkoni, eĉ supraj, tiun ekipaĵon, ankaŭ ege utilos por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri nia poezio, ĉu originala, ĉu tradukita. Ankaŭ ili profitu la okazon por havigi al si la meritplenan gvidlibron.

A. Samyn

"Biblia Revuo" 5a jaro ; numero 1, 1969. 64 paĝoj. Adreso : Angelo Duranti, Piazza Duomo, 4 - 48100 Ravenna, Italujo.

Tiu scienca revuo prezentas artikolojn kiuj povas interesi nespecialistojn. Por pruvo, jen la enhavo de tiu numero : 1) La Biblio moderne tradukita, de D. Broadribb ; 2) La Ofer-ritoj en Islam, de Abdul Haliq Quazi ; 3) enhavo de revuoj ; recenziĝas pri nia poezio, ĉu originala, ĉu tradukita. Ankaŭ ili profitu la okazon por havigi al si la meritplenan gvidlibron.

Wouter Pilger : "En frua Majmateno". Broŝureto de 16 paĝoj. Prezo : 28 Fr.

W. Pilger tradukis tie-ĉi il pecojn de la Mezepoka Nederlanda literaturo. Unu estas el la "Spegulo de la Laikulo" de Jan Boendale ; alia estas la eble plej bela poemo de Johano, la duko de Brabanto. Kompreneble enestas ankaŭ ampoemo de la fama Limburgano Henrik de Veldeke. Ktp. La tradukoj estas tre bonaj. La titolo venas el la unua verso de la citita poemo de duko Johano de Brabanto. Ni esperas ke W. Pilger daŭrigos. Por informo mi aldonas ke nia priplorata talenta poeto kaj delikata animo Hector Vermuyten estis tradukinta ĉirkaŭ trionon de la legendo de Beatrice kaj la tutan "Renardo la Vulpo"... Sed ili ne ankoraŭ estas eldonitaj.

Latva Poezio (1945-66). Libreto 70 paĝa. Eldonejo "Zvaigzne" en Riga, 1968. Prezo : 17 kopekoj. Adreso : Latvijas un Arzemju Draudzibas un Kulturas Sakaru Biedriba " Gorki iela 11-a, RIGA ; Latvia S.S.R. en la Sovjet-Unio (U.S.S.R.).

Por la tioma fojo ni devas ripeti ke dank' al Esperanto ni povas kontakti literaturojn kiujn alie ni ne malkovrus. Jen unu plia pruvo. De 22 poetoj enestas poeziaĵoj kiujn preskaŭ ĉiujn tradukis E. Lippe. Kvankam ili estas kompreneble malegalaj je valoro, la tuto estas tamen trezoreto de poezio. Bone enkondukas ĝin Mirdza Burgmeister. Kuraĝige ke ankaŭ tie - kiel ĉie - gesamideanoj laboras por nia afero kaj pliriĉigas nian Esperantokulturon.

Teo Jung : "Tri Homoj flugis al la luno... sed Mondlingvanoj kverelas" kaj Paul Lobut : "Dekdu necesaj Rimarkoj". Stencilita eldono de 24 paĝoj. Prezo : 2,25 Ned. Guld. + 0,25 por sendkostoj. Eldonis "Heroldo" Harstenhoekweg 223 Scheveningen, Nederlando.

Pri kio temas ? Pri la problemo ata - ita. Ankoraŭ kaj ĉiam. Oni povus pensi ke T.J. elĉerpis la problemon post lia analizo de la verkoj de Zamenhof. Sed ne. Nun li metas la problemon... en la kosma kadro. Kun patoso T.J. malhonorigas la "skandalon" ke "en nia tempo, kun ira - revena vojaĝo al la luno, la aŭtoritatoj nenion faras por la interkompreniĝo de la homoj ; ke interlingvistoj inter si kverelas ; kaj, trie, ke esperantistoj kverelas pro "persona vidpunkto pri la signifo de unu detalo gramatika". T.J. iom troigas, foje naivas kaj kelkloke malĝustas. Naiva estas la aserto ke "kiam jam ekzistus amika kunlaborado de ĉiuj sinceraj interlingvanoj ...ni povus kun tiom pli granda sukceso ataki la... regnajn instancojn" (p.5). Ni kredas ke nur la cirkonstancoj devigos ilin ŝanĝi sian sintenon. Malĝusta estas la aserto sur p. 5 ke la "itistoj volas ne tekste sed serĉe ŝanĝi detalon de la Zamenhofs gramatiko". Ne. Ili konstatas la zamenhofan uzon... kaj volas devigi nin sekvi ĝin... eĉ ĝis en la malbona. Estas vere ke Zamenhof nenie disvolvis la teorion de la itistoj. Sed la itistoj konstruis sian teorion sur la bazo de la uzado de Zamenhof. (p. 12, supre). T.J. ankaŭ devus indiki fonton kiam li citas gravajn dirojn, ekz. tiun de Zamenhof pri eventualaj estontaj ŝanĝoj al la lingvo (p. 5). Ankaŭ ; ni ne troigu. Tiu kverelo daŭras jam de post jaroj. Ambaŭflanke oni profetis la katastrofon, se oni viciĝus je ilia starpunkto. Do, kio okazis ? Ĉu la esperantistaro disfalis ? Ne. La esperantistaro laciĝis je tiu afero, indiferentiĝis. La sola sekvo ĝis nun konstatebla estas ke ne malmultaj verkantoj de artikoloj iom senzorge uzas ĉu ita, ĉu ata, kaj do ne malofte elektas la neĝustan tempon. Kaj tio estas bedaŭrinda... sed eble ne plu daŭros longtempe.

En kio T.J. pravas ? 1) ke la itismo havas unu formon por du tempoj (p. 12, supre) ; 2) ke, se sekvi ĉiam la itismajn postulojn, oni venas kelkfoje al frazoj kiuj estas tute absurdaj. (vidu refoje ekz. p. 14, meze ; kaj p. 18, sube). Tiujn du aferojn T.J. jam montris pli ol sufiĉe. Li ne bezonis verki plian broŝuron. Laste ; T.J. kiu tiel insistas pri la facileco de Esperanto ne mem proponu neĉesajn komplikajojn kiel sur p. 19.

En la lastaj kvar paĝoj la Pariza juristo Paul Lobut atakas la Akademian komunikon de 25-11-'67. Kelkfoje oni diras ke la Germanoj estas por la atisma sistemo ; dum ke Slavioj kaj Romanidoj estas por itismo. Tio montriĝis jam ne ĝusta. Ili estas ĉiuj dividitaj. Jen estas ekzemplo de Romanido kiu defendas atismon. Kompreneble oni rajtas demandi en kiu mezuro la malfavora recenzo de prof. G. Warringhien pri la traduko de la "Spleno de Parizo" fare de P. Lobut inspiris la sintenon de tiu lasta. Mi neniel volas sugesti ke estas tiel. Mi nur faras tiun demandon ĉar... nu ĉar tio estas tiel hom-eca.  
Drs. F. Roose

La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (S-ro Iserentant B.) Kerklaan 61 BRUGO. Poŝtĉekkonto 152140



Ensendojn por la

aŭtuna

numero ni petas

antaŭ la 1.9.1969

(aperdato fine

de septembro).



Helsinki, 26 julio - 2 aŭgusto 1969

Konstanta adreso :

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Logado malmultekosta

Lastatempe LKK eltrovis eblecon loĝigi kongresanojn en aparta komuna loĝejo po 4,50 fmk (= 3,80 gld.) por ĉiu nokto. Por tiu loĝejo NE necesas antaŭpago, sed JA necesas pagi la kutiman maklerajon de 5,- gld. Kongresanoj, kiuj deziras profiti tiun eblecon, bonvolu klare indiki sur sia mendilo por loĝado (el la Dua Bulteno) : "Kategorio F - Komuna Loĝejo po 3,80 gld."

**Teatra progamo definitiva**

Internacia Arta Teatro anoncas, ke la definitiva programo de la Oficiala Teatra Prezento (dufoje) estos jena : "Vilhelmo la konkeranto", unuakta tragikomedio de Vanča Kljakkovic, "Aparta ĉambro", unuakta komedio de Claude Santelli, kaj "Hotelo", ŝerca sceno de Branko Ćopić. La t.n. "Libervola Teatra Prezento" enhavos : satiran komedion "Sonoriloj" de Smiljan Rozman, kaj la du-partan dramon de Milan Begovic, "Sen la tria".

**Nova gramafon-disko preta**

"Ĉi tie sola kantas mi" estas la titolo de nova gramafondisko, kiu enhavas ses el la plej belaj finnaj popolkantoj. Kantas ilin Sirkka Lehtivaara, jam konata pro sia prezentiĝo en la Varia Arta Vespero en Madrid. Akompanas fortepiane Marja Oja. La diskon eldonis firma Skandia, kaj ĝis estos aĉetebla en la kongresejo po 10,50 fmk. Antaŭmendojn akceptas Oskari Lehtivaara, Aleksis Kivenkatu 22-A, Helsinki 50, Finnlando.

**Debatontoj jam preparis sin**

Novajo en la programo de la 54a UK estos la Debato, ĉi-foje je la temo : "Esperanto - ĉu ideologia aŭ praktika instrumento ?" La batalagojn jam pretigas la enkondukontoj de la Debato : S-ino Emilija Lapenna (por la ideologia flanko) kaj s-ro E.L.M. Wensing (por la praktiko).

**Aliĝintoj**

Ĝis la 15a de majo aliĝis entute 1530 personoj el 35 landoj.

## FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

**FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO**

TRANSPRENO	125.141 F
S-ino Lecat (Antverpeno)	1.000 F
S-ro Van Roye (Heule)	500 F
Ges. Mathieu-Plumhans	73 F
S-ro Noldus (Essen)	285 F
S-ro Van Gompel (Edegem)	80 F
<hr/>	
Koran Dankon !	127.079 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

**ANTVERPENO**

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"

Kunsidoj : Ĉiuvendrede en Brasserie

"Capitole", Gemeentestraat 15

Antwerpen je la 20,15a horo.

Poŝtĉeknumero : 726.54.

La 7an de Februaro, s-ro Paul Peeraerts gvidis la ĉeestantojn tra Turkujo. Post mallonga enkonduko, en kiu li precipe akcentis la gravan rolon kiu ludis Mustafa Atatürk, la parolanto montris grandan kvanton da koloraj lumbildoj kaj samtempe rakontis pri mil kaj unu sciindaĵoj el Turkujo, la lando kiu troviĝas sur du kontinentoj : Azio kaj Eŭropo.

Menciinde estas, ke dum ĉi tiu montrado, tutnova epidiaskopio estis uzata, kiu povas projekcii la bildojn multe pli klare ol la antaŭa.

La postan semajnon, denove la junularo prezentis vesperon de ege alta valoro. S-ro Jo Haazen respondecis pri la tuto. Post la aŭskultado de klasikaj muzikajoj el la verko de Johan Strauss, Johannes Brahms k.a., s-ro Haazen aŭdigis poeziaĵojn de Julio Baghy.

Dum la dua parto, s-ro Paul Peeraerts enkondukis du esperanto-lernantojn, s-ron Koen Donkers kaj finon Lutgart Visterin, kiuj, ĉu kune, ĉu aparte, prezentis klasikajn kantojn, akompanatajn de piano.

La 21an de la sama monato, 29 verdstelanaj kunvenis por ĉui la vojaĝo de s-ro René Balleux al Ventimiglia. Post mallonga, sed ege sprita enkonduko, dum kiu li en kelkaj vortoj skizis la historion, geografion kaj temperamenton de Italujo, li tuj komencis montrante lumbildojn pri tiu apudfranca sunradia regiono, pere de nia nova epidiaskopio.

Foto-kvizo kun premioj gvidata de f-ino Agnes Geelen estis la titolo de la sekvanta programo. Ĉiu membro devis kunporti foton el sia junaĝo kaj la tasko de la aliaj estis kompreneble diveni kiu estis kiu. La ridoj abundis kaj gaja atmosfero ekregis en la salono, precipe ĉar ofte neniu akordiĝis pri la nomo de la montrita persono. Kvin ĉeestantoj ricevis libropremion. Gratulojn kaj dankon Agnes pro via bona ideo !

La unuan vendredon de Marto, s-ro Verstraeten prezentis la novajn estrojn, elektitajn dum la antaŭa komitata konferenco. Honora prezidanto :

GRUPA  
VIVADO

Maurice Jaumotte ; Honora vic-prezidanto : Henri Sielens ; Prezidanto : Jules Verstraeten ; Vic-prezidantoj : Ivo Durwael kaj Jo Haazen ; Sekretario : Paul Peeraerts ; Kasisto : René Balleux ; Animantino : Agnes Geelen ; Instruisto : Rik de Roover ; Komitatoj : Imelda Haazen, Jozef Montmirail, Eugeen Paesmans, François Schellekens kaj Remy Van Eynde.

La saman vesperon, denove altnive-la programo estis prezentata al la antverpenaj esperantistoj, tiun ĉi fojon de D-ro Wim de Smet, kiu traktis pri „Kiusence la delfenoj estas inteligentaj ?” Post mallonga enkonduka vorto de s-ro Jo Haazen, D-ro de Smet, kun granda kompetenco kaj en fluga esperanto, klarigis al ni kiel ni devas kompreni la mirindajn farojn de ĉi tiuj animaloj. La tuto estis substrekata per la montrado de diapozitivoj kaj lumbildoj, kaj per la aŭdigo de surbendigitaj sonoj de delfenoj. Ne nur agraba sed krome ege instrua vespero. Ĝis baldaŭa revido, D-ro de Smet !

La 14an venis la kutima filmvespero organizata de s-ro Remy Van Eynde. Kvar diversaj dokumentaj filmoj, nome : „Subakvaj mortigantoj” pri la vivbatalo de la fiŝoj, „Moderna Sudafriko”, „Ĉe la bordoj de la Leie-rivero” kaj „Parizo kaj ties ĉirkaŭo”. Tiu ĉi lasta estis elfrancigita de s-ro Paul Peeraerts kaj poste parolita kaj adaptita de la sama persono.

Diplomdisdono kaj debato estis la ĉefpartoj de la posta kunveno. Dum la diplomdisdono kvar novaj sukcesintoj de la kurso (ĉar estas ĉifoje nur "inoj") ricevis krom sian ateston, esperanto-pinglon kaj premiojn. Ili estis

LES ENTREPRISES

**DERKS**

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ



sino Marcelle De Muynck, f-inoj Rik de Cleyn, Lydia kaj Carine De Muynck. Tiu ĉi lasta laŭlegis dankleteron al la profesoro s-ro Rik de Roover kaj trandonis belajn donacojn.

Tuj poste estis la vico al s-ro Roger van Humbeeck el Bruselo, kiu ege lerte enkondukis la debaton pri la aŭtoritata krizo. Lia intenco estis paroligi kiel eble plej multe da geĉeestantoj.

La 28an, 30 verdstelanoj ĉeestis vesperon pri katoj kaj hundoj. Efektive, f-ino Agnes Geelen rakontis sciindaĵojn pri tiuj ĉi amindaj bestetoj kaj prelegis, inter aliaj, poeziadojn de Verwey, esperantigitan de s-ro Rik de Roover.

Dum Sankta Vendredo S-ro René Balleux laŭlegis tekston pri Pasko en Anglujo. S-ino Lecat prelegis interesigan tekston, tradukitan el la angla de la parolantino mem, pri la vivo de Teresa Neumann. La teksto certe estis konvena je tiu ĉi vespero.

Post la paŭzo venis amuza parto sub gvidado de s-ro Balleux, kompreneble kun paskovoj kaj multe da gajeco. S-ino De Hondt kaj s-ro Smets ambaŭ iris hejmen kun granda ĉokolada ovo! S-ro Jo Haazen, patro de nova denaska esperantistino, montrigis bildojn pri sia unua filino pere de la epidiaskopo. Por fini s-ro Balleux denove prezentis programeron pri Han van Meegeren, pentristo kiu imitis la faman pentraĵon "La irantoj al Emmaus" de Vermeer.

El Bruselo venis s-ro Fighiera por rakonti al ni pri la "Krucmilito kontraŭ la Kataristoj". Li klare kaj elokvente skizis por ni ne nur la krucmiliton mem, sed havigis bonan ideon pri la vivmaniero en tiu epoko. Li vere rakontis kun multaj anekdotoj kaj kuriozaĵoj. Poste venis ankoraŭ montrado de deko de lumbildoj kiuj substrekis la enhavon de la parolado.

La 18an de Aprilo s-ino Bernaerts pli ol unu horon rakontis (sen iu paŭzo!) pri la vivo de Ghandi kaj tiel kaptis ĉies atenton. Ŝi interalie menciis la paralelajn vivojn de Ghandi kaj Zamenhof, daŭ senarmaj batalintoj por la paco kaj la kompreno.

#### NEKROLOGO :

Mortis nia membrino, fraŭlino Françoise Jaspers, en sia 88a vivjaro. Ŝi aniĝis en 1952 kaj tial ricevis la medalon pro fideleco de la „Verda Stelo“.

La estraro esprimas siajn sincerajn kondolencojn al gesinjoroj Debacker,

ankaŭ membroj, kaj al la aliaj parencoj de la forpasintino.

La raportintoj, Ivo Durwael  
Rik de Roover Paul Peeraerts.

## L I E Ĝ O

La 21an de januaro D-ro Denoël prelegis en la komunuma kultura centro de Embourg, laŭ invito de la tiea skabenaro. La aŭdantaro, tiel multnombra ke ĝi tute plenigis la salonon, faris poste multajn demandojn. Evidentiĝis ke tiu aŭdantaro konsistis precipe el geinstruistoj kaj gepatroj de lernantoj.

La grupkunveno okazas en "Prince de Liège" en la strato Général Jacques (kaj ne str. Général Bertrand, kiel malĝuste anoncote en "L'Esperanto en marche").

## BRUĜA GRUPO ESPERANTISTA

### REGA SOCIETO

Kunveno : marde je la 20-a horo, en "Strijdershuis, Hallestraat 14 (apud "Markt)

Adreso de la prezidanto : Ch. Poupeye Filips de Goedelaan 17-bis, Brugge. Tel. (050) 183.58.

La 18an de februaro, en la prezidantejo, S-ino. S. Verbeke-Vanden Berghe paroladis pri "Petrimda Madeira" kun projekciado de belegaj kolordiapozitivaj.

Kunvenoj de la L.K. okazis plurfoje ek de la 25-a de februaro kaj ĉiam plioftiĝis ĝis la kongresaj tagoj.

Dum la kunveno de la 4a de marto, S-ro. Ch. Poupeye detale raportis pri la administrantara kunsido de BEF okazinta la 22an de februaro en Bruselo.

La 18an pluraj grupanoj ĉeestis en "Volksschouwburg" admirindan prezentadon de artaj kolordiapozitivaj faritaj de S-ro. Walther Benser.

La 25-an Ges-roj. A. De Wasch-Rosel prezentis belegan memfaritan kolorfilmon kun komentario kaj adaptita muziko pri Norvegujo.

Dum la kunveno de la 1-a de aprilo S-ro. Ch. Poupeye raportis pri la kunsidoj : administrantara kaj ĝenerala, okazintaj en Bruselo la 29an de marto, kaj ankaŭ pri samtaga vizitado fare de la grupaj delegitoj al la internacia Libro-foiro en Rogier-centro.

La 15an de aprilo F-ino M. Willems interese raportis pri la Franc-Germana

Esp. Kongreso, kiu okazis en Strasbourg de la 4a ĝis la 9a de aprilo (Pasko) kaj kiun ŝi ĉeestis, malgraŭ la nekompreneble neakcepto de la proponita oficiala partopreno de nia B.E.F.

Dum la kunveno de la 6a de majo, ĉeestata de Ges-roj Hawker el Folkestone, estis entuziasme raportata pri la Markola kaj Belga Kongresoj.

La 10an de majo la grupanoj rezervis al sia prezidanto, S-ro Ch. Poupeye, okaze de lia 50-jara profesia jubileo, agrablan surprizon, per sukcesa akcepto en la domo de la F-inoj Van Parys. La vicprezidantino, S-ino. S. Verbeke-Vanden Berghe, elparolis la festajn vortojn, post kio bela donaco estis proponata al la jubileanto. Komuna vespermanĝo en kampara restoracio kronis tiun memorindan tagon.

## KONDOLENCOJ

Kondolencoj plej vivajn ni esprimas al S-ro. David DEMEULENAERE, vicprez. B.G.E. kaj administranto B.E.F., kies patro, S-ro. Henri DEMEULENAERE, mortis 85-jara, la 12-an de majo.

## GRUPA VIVADO

...pri "PACO kaj JUSTECO" Brugge... kaj pri io pli...

Dum multaj jaroj ni havis konstantan, antaŭe fiksitan programon. Tio ŝanĝiĝis en la lastaj monatoj. Ni havas ankoraŭ kelkajn antaŭviditajn paroladojn pri plej diversaj temoj, lecionojn ktp. Ekzemple, jaŭdon la 25-3-69 nia vicprezidanto, S-ro Maertens donis detalan klarigon pri la nova impostsistemo B.T.W. Tiamaniere ni restas ankaŭ ĉe la aktualeco.

Sed pro la fakto ke pluraj de niaj membroj havas postenon en la tutlanda movado, okazas pli kaj pli ke en niaj kunvenoj ni preparolas la problemojn, la staton, la novaĵojn kaj la atingajojn (aŭ la malon) de niaj landaj internacia movadoj.

Rilate al la "Instituto" nur unu persono estas malkontenta : ĝia direktoro, S-ro Iserentant mem. Ĉi funkciaj tute glate, sed ĝi lasas al li ne unu minuton da ripozo aŭ da libero. Feliĉe ke en la oficejo... tie oni estimas lian laboron. Guste post la markola kongreso atingis lin kaj nin la ĝojiga anonco ke S-ro Iserentant estas nomi-

ta kavaliro kun kruco en la Kronorde-no. Niaj vicprezidanto, S-ro Maertens estas ankaŭ la sekretario de BEF. Li alfrontas multajn problemojn... kaj personojn. Kontestita li estis fakte nur de la avarega kasistino... kaj de kelkaj kiuj atendis "ultra" rapidan respon-

don.

La zorgon pri la Nederlandlingva bulteno kaj pri parto de financoj havas nia grupa trezoristino, kiu mem estas trezoro, Simone De Koninck. Kun "bisnesa eficiento" (vidu baldaŭ aperontan "Suplemento al la Suplemento de la Plena Vortaro") ŝi plenumas sian taskon. Kiu povus do kontestiti? Kaj la zorgo kiu elradias el la bulteno spegulas sian profundan amon al la Nederlanda lingvo mem.

Alia grupestrarano, kaj funkciulo en la sino de BEF, kiu ankaŭ ĝis nun staras alte, tre alte super ĉiu kritiko estas S-ro André Dumarey. Mi konjektas tamen ke unu de la kaŭzoj de tiu ideala stato estas la fakto ke li ankoraŭ tro mallongtempe troviĝas en tiu sino, tiel ke oni tutsimple ne ankoraŭ havis okazon kritiki. Kompreneble ankaŭ en tio-ĉi mi restas, kiel ĉiuj, eraripova homo. Povas esti ke baldaŭ la BEF-Administrantaro spertos ke S-ro Dumarey estas profesia sekciestro en Administrantaro kiu ampleksas centoble, se ne pli, la BEF-Administrantaron.

La revuon "Sonorilo", male, redaktas je absolute ĝenerala malkontenteco la prezidanto de "Paco kaj Justeco" mem. Ne mirinde. Li ja tiel ruze agadis ke finfine li atingis la kasitan celon : nome ke la revuo iĝis lia privata publikigaĵo. Sed eĉ tiu ĝenerala malkontenteco havas sian bonan flankon : oni legas ĝin ; kun la celo trovi kritikindajojn. Kaj tiu fervoro estas tiel arda ke eĉ oni legas la recenzojn pri libroj. En ili jen iu trovas politikajn mikrobojn ; jen alia trovas religiajn bacilojn ; ankoraŭ alia trovas moralajn (aŭ malmoralajn) virusojn. Tamen dum la administrantaraj kaj estraraj kunvenoj de B.E.F. ĉiuj konsentas ke neniu legas ilin.

Kion ĉio tio pravas ? Ke ni, kaj do ke la movado vivas. Jes, la silento estas la morto... eĉ de la reĝoj (= fama dirajo el la Franca revolucio). Kaj se oni parolas pri mortintoj, estas nur por diri... bonon.

Do vivu kaj prosperu plu (sur la sama vojo ?) nia "Paco kaj Justeco".



# manuŝakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056)216.54



## **VIRINAJ BLUZOJ** **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmarko  
por la eleganta sinjorino  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej  
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj  
konfekcibutikoj

### **PRECIPAJ CENTROJ :**

Antwerpen : Aalmoezenierstr. 2  
Anselmostr. 17  
Nationalestr. 87  
Leysstraat 10

Arlon : 12 Marché-aux-Légumes

Brugge : Breidelstr. 8

Brussel : Anspachlaan 194  
Oude Kleerkoperstr. 31

Gent : Brabantdam 21

Herstal : 4 Rue Large Voie

Leuven : Bondgenotenlaan 13

La Louvière : 16 rue Albert 1er

Luxembourg : 67 Place de la Gare

Mechelen : IJzeren Leen 32

Oostende : Kapelstraat 23

Roeselare : Ooststr. 124

Tournai : 75 Rue Royale

Turnhout : Herentalstr. 6

Verviers : 2 Pont St. Laurent

Wetteren : Jos Buyssestr. 39-a